

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj



Numero 79, novembro-decembro 2025

Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio, en mesaĝo okaze de la Internacia Tradukada Tago, la 30-an de septembro 2025, emfazis la gravecon de translingva komunikado

Traduki estas alproksimigi lingvojn, kulturojn kaj homojn. En tiu spirito ni festas la Internacian Tradukadan Tagon, en epoko kiam ni bezonas plifortigi nian kapablon interkompreniĝi, kaj rekoni nian komunan homecon. Tradukado kaj interpretado estas, kune kun la serĉado de lingva komuneco, vojoj por paca kunezisto.

Ni aparte bonvenigas la ci-jaran temon de la Internacia Federacio de Tradukistoj: “Tradukado: krei estontecon kiun oni povas fidi.” Ĉiu lingvo, inkluzive la plej malmulte parolatajn lingvojn, havas sian apartan, home kreitan, aliron al realo, kiu meritas atenton kaj konservadon. Nur homa interveno povas fidiinde transporti signifecon de unu lingvo al alia, eĉ se ekzistas multaj teknikaj helpiloj. Lingvoj estas kreitaj de homoj: tradukado kaj interpretado dependas de la homa juĝkapablo.

Per la Internacia Tradukada Tago, Unuiĝintaj Nacioj honoras tradukistojn kaj interpretistojn, esprimante subtenon al ilia grava sed ofte nevidebla, aŭ eĉ mistraktata, laboro de transportado de la lingvoj de la mondo. Tradukado kaj interpretado estas vojo al egaleca pritrakto de ĉiuj lingvoj, kaj sekve de ĉiuj homoj -- ĉar ĉiu homo havas fundamentan rajton libere esprimi sin, kaj esti aŭdata kaj komprenata, en la propra denaska lingvo.

Lingvoj havas fundamentan rolon en kultura diverseco, interkultura dialogo kaj edukado. Per lingvoj, ni povas plifortigi kunlaboradon, konstrui pli inkluzivajn sociojn, konservi kulturan heredaĵon kaj kunvoki politikajn volojn. Sed ĉio ĉi povas okazi nur se okazas dialogo ankaŭ trans lingvaj diferencoj. Multlingveco signifas, ke ĉiu povas paroli kaj pensi en sia propra lingvo. Tradukado ebligas agnoski aliajn lingvojn kaj kulturojn, kaj samtempe rekonsideri la proprajn.

En tiu ĉi tago, ni ree esprimas nian subtenon al multlingvismo kiel kerna valoro de UN, salutas la internaciajn organizaĵojn de tradukistoj kaj interpretistoj, kaj reasertas nian celon antaŭenigi, ankaŭ per la Internacia Lingvo Esperanto, interkompreniĝon kaj estimon inter la popoloj de la mondo. Ni forigu la murojn de miskompreno, malfido kaj diskriminacio, tiel ke homoj vidu kaj aŭdu unu la alian kiel gefratoj en riĉa kaj harmonia mondo.

Longe daŭru la lingva diverseco, sed longe daŭru ankaŭ interlingvaj kaj interpopolaj kontakto kaj interkompreniĝo – per tradukado, interpretado – kaj ankaŭ la Internacia Lingvo Esperanto.

Unuiĝintaj Nacioj laboras por multlingvismo

La 8-an de septembro, 2025, la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, kune kun la Internacia Organizo de la Frankofonio (OIF), kunvokis specialan prezenton pri la iniciatoj pri multlingvismo lanĉitaj de la Oficejo de la Prezidanto de la 79-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN (OPGA). La aranĝo, organizita virtuale, kun interpretado en ĉiuj ses oficialaj lingvoj de UN, estis la unua okazo kiam la koncerna multlingvisma laborgrupo publike prezentis sian internan laboron.

La Prezidanto de la 79-a Sesio, Lia Ekscelenco s-ro Philemon Yang, frue identigis multlingvismon kaj multkulturismon kiel fundamentajn elementojn de sia prezidanta periodo, nomante ilin “fundaj rokoj de kultura diverseco” kiuj spegulas la riĉecojn de popoloj kaj nacioj tra la tuta mondo. Lia administracio starigis laborgrupon pri multlingvismo por kernigi lingvan inkluzivismon tra la tuta gamo de la laboro de OPGA, inkluzive de daŭripova evoluigo, homaj rajtoj, humanitaraj aferoj, politikaj aferoj, kaj paco kaj sekureco.

Malfermajn rimarkojn de la kunsido prezentis profesoro Francis Hult, prezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj, kaj reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio al UN. Profesoro Hult emfazis, ke multlingvismo ne estas nur afero de lingvaj servoj aŭ lingvaj rajtoj, sed fundamento por inkluziva partopreno kaj efika internacia kunlaboro. La Konstanta Observanto de Internacia Organizo de la Frankofonio, Lia Ekscelenco s-ro Michel Xavier Biang, ankaŭ alparolis la partoprenantojn, esprimante la jam longedaŭran sindediĉon de OIF al antaŭenigo de multlingvismo en UN.

La ĉefan substancan prezenton faris Blanca Montejo, la vica buroa estro de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo. Ŝin akompanis du membroj de la laborgrupo, Noof Alotaishan kaj Felix Eboa.

Ili skizis la tutjaran strebadon de la laborgrupo por integri multlingvismon en la laboron de OPGA, emfazante samtempe la atingojn kaj la daŭrajn defiojn. Inter la atingoj priskribitaj de la laborgrupo estis praktikaj paŝoj por certigi multlingvan aliron al ĉefaj komunikaĵoj de la PGA, pli vasta uzado de interpretaj kaj tradukaj rimedoj, kaj iniciatoj kiuj celas enkonstrui lingvan inkluzivecon en laborfluojn rilatajn al daŭripova evoluigo, homaj rajtoj, humanitara respondado, kaj paco kaj sekureco. La laborgrupo ankaŭ notis progreson en engaĝado de membroŝtatoj kaj civilsociaj agantoj en dialogon pri lingva egaleco. Progreson oni notis ankaŭ en konsciigo, ke multlingvismo estas esenca por plene signifi partopreno en la agado de UN. La laborgrupanoj samtempe rekonis la daŭrajn defiojn, inkluzive limigitajn rimedojn, malegalan realigon en la diversaj eroj de la UN-sistemo, kaj bezonon de pli fortikaj instituciaj sindediĉoj por subteni progreson en estontaj sesioj.

Invito al malferma dialogo sekvis la formalajn prezentojn, kaj partoprenantoj direktis demandojn al la laborgrupo. La prezento finiĝis per rimarkoj de profesoro Humphrey Tonkin, emerita prezidanto de la Universitato de Hartford kaj jam delonga pledanto por multlingvismo en UN.

La dato de tiu ĉi informa kunveno, nur kelkajn tagojn antaŭ la fermo de la 79-a sesio, substrekkis la fortan atenton al multlingvismo sub la gvidado de Prezidanto Yang. La aranĝo kunvenigis larĝan gamon de interesatoj el UN. Inter la partoprenantaj membraj ŝtatoj estis Argentino, Gabono, Kipro, Monako, Maroko, Rumanio, kaj la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. Reprezentantoj de abundaj UN-filioj ankaŭ aliĝis. Inter tiuj kiuj partoprenis estis UNECA (UN Ekonomika Komisiono de UN

por Afriko), ITU (Internacia Telekomunika Unio), UNHCR (Alta Komisiono de UN por Rifuĝintoj), UNMISS (Misio de UN en Suda Sudano), DGACM (Departemento de UN pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj konferencoj, UN- Najrobo), UNMOGIP (Milita Observa Grupo de UN por Barato kaj Pakistano), UNIFIL (Intertempa Forto de UN en Libano), UN-Vieno, UN-Ĝenevo, ECLAC (Ekonomia Komisiono por Latinameriko kaj Karibio), WHO (Monda Organizo pri Sano), IAEA (Internacia Atomenergia Agentejo), kaj IIM (Internacia Senpartia kaj Sendependa Mekanismo). La prezento ne nur elmontris la atingojn de OPGA 79 pri tiu ĉi temo, sed ankaŭ demonstris kiel la Komitato de NROj pri Lingvoj rolas kiel ŝaltilo liganta membrajn ŝtatojn, UN-stabanojn, kaj civilan socion.

La speciala prezento montris kiel multlingvismo ebligas signifoplenan aliron al informado, edukado, kaj civila partopreno -- kaj samtempe fortigas multkulturan dialogon, kontraŭbatalas ekstremismon, kaj nutras kunlaboradon. La partoprenintoj akiris pli klaran komprenon de la iniciatoj de OPGA kaj fortigis sian komunan konvinkon por antaŭenigi lingvan inkluzivismon en ĉiuj terenoj de la laboro de UN. [Pri multlingvismo en UN, vidu: <https://www.un.org/sq/en/multilingualism/index.shtml>]

[raportis FMH]

Grupo de Amikoj de Multlingvismo lanĉiĝis en UN

En sia laboro en Unuiĝintaj Nacioj, UEA emfazas la gravecon de multlingvismo: respekto de la unuopaj lingvoj, eltrovo de manieroj transponti lingvojn (inkluzive de interpretado kaj tradukado), luktado kontraŭ misa lingva diskriminacio, kaj kompreneble pli aktiva utiligo de Esperanto.

En UN, membroŝtatoj ofte starigas specialajn grupojn por kunlabori pri komunaj celoj. Interalie, ekzistas ankaŭ lingvaj grupoj, kiuj kunigas ŝtatojn por antaŭenigi siajn lingvojn kaj komunajn interesojn, ekzemple, pri francparolantoj, hispanparolantoj kaj portugalsparolantoj.

Bona novaĵo estas, ke aperis nova esperplena grupo: la Grupo de Amikoj de Multlingvismo. Ĝi estas koalicio de membroŝtatoj de UN, kiu volas antaŭenigi multlingvismon en Unuiĝintaj Nacioj, kiel vojon por multflankismo kiu respektas lingvan kaj kulturan diversecon.

Profesoro Francis Hult, reprezentanto de UEA ĉe UN kaj prezidanto de la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj (starigita laŭ iniciato de UEA), estis invitita fari paroladon ĉe la lanĉo de la Grupo de Amikoj de Multlingvismo, en la sidejo de UN en Novjorko. La invito venis sekve de speciala raporta kunsido, organizita de prof. Hult kaj aliaj, pri iniciatoj de la Prezidanto de la 79-a sesio de la Ĝenerala Asembleo (2024-2025) por antaŭenigo de multlingvismo. La lanĉo estis kunorganizita de la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj kaj La Frankofonio (la organizo de francparolantaj landoj).

Ministroj pri eksterlandaj aferoj el Andoro, Ekbordoj, Hispanio, Kuvajto, Mozambiko, kaj Portugalio, kune kun la Vica Konstanta Reprezentanto de Kanado, la Asista Ĝenerala Sekretario por Konferenca Administrado, kaj la Ĝenerala Sekretario de la Internacia Organizo de la Frankofonio (OIF) partoprenis por montri sian engaĝiĝon al multlingva multflankismo. En sia parolado, prof. Hult atentigis la ĉeestantojn, ke multlingvismo ne temas pri multaj unulingvismoj,

sed pri interkomunikado kaj interkompreniĝo trans lingvoj kaj kulturoj, kun speciala celo konstrui solidarecon. Fronte al mondaj defioj kaj internaj defioj de UN, la nova grupo estos voĉo pri la graveco de multlingvismo, kiel valoro kaj praktiko, por vera internacia justeco, homaj rajtoj, paco, kaj socia evoluigo por ĉiuj.

[raportis RL]

Konferenco de NROj daŭrigas sian interesiĝon pri lingvaj demandoj

Per elekto de TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, al la Estraro de la Konferenco de NROj en Konsulta Statuso kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO), la Konferenco daŭrigos sian interesiĝon pri lingvaj demandoj en UN. La elekto okazis fine de la Ĝenerala Asembleo de CoNGO en Novjorko la 28-an de oktobro.

Universala Esperanto-Asocio aktivas en CoNGO jam de multaj jaroj, reprezentante la Esperanto-movadon kaj ties subtenon de internacia dialogoj kaj lingvaj rajtoj en UN. En la jaroj 2022, UEA kaj pli ol dudek aliaj NROj fondis la Komitaton de NROj pri lingvoj (CoLL) kiel Substancan Komitaton de CoNGO, por altiri pli grandan atenton al lingvaj demandoj en UN, lingva egaleco, kaj la problemoj de lingva diskriminacio. Prezidas la komitaton Francis M. Hult, reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio al UN.

Kiel antaŭa estrarano de CoNGO, Universala Esperanto-Asocio venis al fino de sia mandato ĉi-jare. La elekto de TEJO garantias ne nur, ke la Esperanto-movado daŭre havu aktivan reprezentiĝon en la gvidado kaj plifortigo de la rolo de neregistaraj organizoj en UN, sed ankaŭ, ke la demando de lingvoj kaj lingvaj rajtoj restos sur la tagordo de CoNGO. Kiel junulara organizo, TEJO ankaŭ helpas reprezenti la voĉon de la junularo en CoNGO kaj inter ties membraro. UEA deziras al TEJO ĉian sukceson en la nova taskigo kaj promesas sian subtenon.

Universitatoj lanĉos programon pri Esperanto

‘Esperanto kiel interdisciplina kampo de transnacia novigo’ estos la titolo de nova programo Erasmus BIP lanĉota de koalicio de universitatoj en ok landoj: Francio, Belgio, Nederlando, Germanio, Hispanio, Italio, Romanio kaj Turkio. La programon kunordigos la Universitato de Tours, Francio. Ĝi estos malferma al ĉiuj universitatoj kiuj [artoprenas en la Skemo Erasmus.

Bonvenaj estos studentoj de kiu ajn fako de la humanaj kaj sociaj sciencoj, je ĉiuj tri niveloj: bakalaŭra, magistra kaj doktora, kaj ankaŭ al universitataj stabanoj kiuj deziras malfermi siajn esplorojn al aspektoj de transnacia navigado pere de Esperanto.

La programo BIP konsistos el du partoj: distanca fazo (jan-majo 2026) kaj vizaĝalvizaĝa fazo (1-5 junio 2026) okazonta en Tours, Francio. Sinproponoj estos malfermaj ĝis 15 novembro. Kontakto: philippe.planchon@univ-tours.fr

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.